

FEDERACIA KUNVENO de la 7a de oktobro en Béziers

Partoprenis 24 personoj, senkulpiĝis Charles Gérard-Voinçon kaj Georges Gonthier .

Post la salutoj de la prezidanto Jean Hénin (JH) kaj prezento de ĉiu, ni salutis la memoron de Yvette Vierne, kiu forpasis en julio . Danksalutojn al André Capus, kiu rezignis pri la presado kaj ekspedo de « Sudfrancia Stelo », post multjara prizorgado . Bondezirojn de resaniĝo al tiuj, kiuj havis sanproblemojn lastatempe .

Someraj eventoj : Pluraj federacioj partoprenis la Universalan Kongreson de Florenco kaj koncize raportas pri siaj impresoj (la unua UK por iuj) . 2200 partoprenintoj . Estas ĉiam plezuro babilu kun gesamideanoj el diversaj landoj . La programo surprizis pro la diverseco kaj riĉeco . Ĉiam necesis elekti ! Veronique (grupo de Béziers) partoprenis la IJK (la internacian junularan kongreson) en Sarajevo ; ŝi estas tre kontenta kaj bone progresis en la lingvo . Josée Boccadifluoco raportas pri la turisma semajno en Katalunio, kie ŝi renkontis gesamideanojn el diversaj landoj (Japanio, Germanio, Meksiko, Korea respubliko...). Ŝi ricevis por Sro Lentaigne la premion Ada Fighiera-Sikorska, atribuata, ĉiujare al elstara esperantisto, kiu sin dediĉis al la internacia lingvo . Ni gratulas nian amikon, kiu, inter aliaj, verkis plurajn librojn . Du Béziers-anoj partoprenis muzikan staĝon en Bouresse .

Forumoj de asocioj : (*vidu la raportojn pri ili*). La unua estis en julio en Campagnan ; iom da sukceso ; venontjare la urbestro intencas organizi ĝin en majo . En Béziers la budo ne estis bone lokita, rezulte ne estis multaj vizitantoj kaj neniu novulo por la unua kurso . En Montpellier, bona rezulto, almenaŭ 4 novaj gelemantoj . La forumo de Lunel okazis samtage kiel nia kunveno, ŝajne estas pluraj novaj gelemantoj . Ges. Bernard havis standon en Mende kaj Ruynes kun bonaj kontaktoj . Estas disdonata la nova informilo de E°-France, kiun ĉiu leganto de SFS ricevos kun la venonta bulteno .

Esperanto-semajnoj en nia federacio . Christian Herbette, nome de la semajno de Batipaume, kaj Jean-François Passarella, nome de tiu de Sète, klarigis, kial la du semajnoj ĉijare estis deficitaj . En ambaŭ kazoj malkreskis la nombro da aliĝoj . 22 staĝanoj en Batipaume, malgraŭ elekto de temo (la ĉirkaŭumo), vizitoj laŭtemaj al la marbordo kaj al biologia bieno . La federacio surprenas la duonon de la defcito de Batipaume ; pri Sète estas iom da mono en la kaso kaj neniu subteno estas petata por la momento . La asocio « E°- kulturo kaj progreso », kiu prizorgas la semajnojn de Sète, havos sian ĝeneralan kunvenon la 15an de oktobro . Pri la datoj de la semajnoj en 2007 oni devas rekonsideri la elekton ; necesos informi frue .

SFS – retpaĝoj : La bulteno estas ĉies afero . Sendi kontribuojn antaŭ la limdato, laŭeble kun ilustraĵoj aŭ fotoj . Pri la retpaĝoj : neniu solvo, estas plano havi ĝeneralajn paĝojn kun UFE/Jefo kaj poste ligojn al la federacioj aŭ fakaj asocioj .

Decembro : prelegturneo kaj Z-tagoj : Pro neeblo disponi pri salono, ankaŭ pro la daŭro de la restado de la prelegonto el Nepalo –nur duontagon- la grupo de Béziers rezignas kun bedaŭro kaj la grupo de Montpellier akordiĝos kun Renée Triolle (La Ciotat) pri la daŭro de la restado . Pri detaloj koncerne tiun viziton, la 17an de decembro, rilati kun la tiea grupo (Esperanto.montpellier@wanadoo.fr / 04.67.59.80.13) . Post diskuto, la Z-tagoj okazos la 2an de decembro en Béziers kaj la 9an en Montpellier .

Montpellier : Pro la forpaso de Yvette Vierne, necesos decidi pri nova UEA-delegito (rilati kun R. Triolle, ĉefdelegito por Francio) . La nombro da gastigantoj en « Pasporta Servo » malkreskis en Montpellier, estus bone trovi novajn (laŭeble antaŭ la 1a de novembro) .

Federacia kongreso : pro la balotoj en 2007, la paskaj ferioj, la longaj semajnfinoj, nur restas ebleco por la 12a/13a de majo . Teorie dimanĉe, krom se ne estos disponebla salono en tiu tago . La urbdomo de Sète respondis, ke oni devas refari la peton plej frue 3 monatojn antaŭ la dato . Marseillan estus eventuale alia ebleco .

Federacia biblioteko : JH klarigas, ke estis nur propono disponigi la librojn de la diversaj grupoj sub unu nomo, ĉiu grupo konservante kompreneble siajn librojn . Kiam la listo estos preta, ĝi aperos en SFS, por ke ĉiu povu pruntepreni librojn okaze de niaj federaciaj renkontoj (antaŭmendante ilin) . En Montpellier la libroj estas stokitaj ĉe Ges. Eysseric; dum la lasta grupkunveno, oni interŝanĝis librojn .

UFE-komitato : Ĉar Georges Gonthier ne plu povas esti en ĝi, necesos trovi iun alian . Josée konsideros reprezenti nin . Ŝi decidis antaŭ la januara kunveno .

Renovigo de la federacia estraro : en 2007 . Nia kasistino Lucette Négron deĵoras jam de 26 jaroj, la prezidanto de preskaŭ samlonge . Ili deziras anstataŭulojn, same kiel la sekretario Charles Gérard-Voinçon . Pripensinde !

Rebato : JH legas la stultan aserton de « Newropeans », kiu intencas sin prezenti kiel partio en la venonta eŭropa baloto . En la oktobra numero de « Science et Vie » estas longa artikolo pri la deveno de lingvoj . Paragrafo mencias esperanton favore . Reagoj estas dezirindaj, oni povas ekzemple mencii la raporton Grin .

Kontraŭetikadoj, kampanjo ĉe deputitoj : Pri kontraŭetikadoj kun E°-teksteto sur vinboteloj, Colette Carbonnel preferas atendi ĝis 2007, kiam ŝia vitbieno ricevos la oficialan konsenton aldoni la mencion « bio » . La respondo de la Ministerio pri klerigado al la deputito de Lozère entenas la samajn argumentojn kiel kutime . Letero por kontesti ilin estos sendata al li . Estus bone, se pluraj el ni kontaktus siajn deputitojn .

Jokohamo 2007 : JH anoncas projekton iri al Japanio per trajno (la transsiberia) tra Rusio, Mongolio, Ĉinio kun reveno aviadile . La vojaĝo povus daŭri unu monaton entute (de mezjulio ĝis mezaŭgusto) . Pluraj interesiĝas . Poste la UK okazos en Roterdamo (2008) kaj Pollando (2009), ĉu en Bialystok, ĉu en Poznan .

Diversaĵoj : Lumbildoj pri Florenco estas pruntepreneblaj de ĉiu, kiu volus prezenti tiun urbon al sia grupo . Estas ankaŭ prezentataj "Gerda malaperis" en formo de DVD, "Poŝamiko" kun baza vortaro kaj allogaj koloraj bildoj (edukado.net), "Kunvojaĝu", instrulibro de Paul Gubbins, eldonita de ILEI, "E° elektronike" Kd-rom kun tre riĉa enhavo por prezenti esperanton (ĉar ĝi estas kopiebla, Christian Herbertte prizorgos plurajn kopiojn), kalendareto 2007, eldonita de Jefo (Ĉiu leganto de SFS trovos ekzempleron en la venonta SFS) .

Francis Bernard anoncas, ke li prelegos pri esperanto la 15an de novembro posttagmeze en la Liceo Chaptal de Mende posttagmeze laŭ peto de Amopa (asocio de la ricevintoj de akademijaj palmoj) .

Ni rendevuas ĝis la Z-tagoj en nia federacio . *Dankojn al la grupo de Béziers, kiu akceptis nin tiel afable (trinkaĵoj, aperitivo, ktp) .*

G.G. / J.H.

Malfruo : Tiu bulteno aperas kun prokrasto . Iuj ne provizas la bezonatajn informojn kaj eĉ ne respondas simplajn demandojn . Alia kialo estas la iom frua naskiĝo de nepo de la redaktoro, kies laborprogramo estis iom perturbita . Dankon pro via indulgo...

SFS, ĉies afero : Baldaŭ venos la tempo renovigi vian abonon al SFS . Ĉu necese rediri, ke grupoj devas sendi kolektive la abonojn, komence de la jaro (la lerneja aŭ la civila) kun indiko de la nomoj de la abonintoj kaj la adresoj, speciale kiam estas adresŝanĝoj ? Estas evidenta neceso ! Izolitaj esperantistoj, ne sendu vian ĉekon rekte al la poŝtĉekkonto sed al nia kasistino (Lucette Négron, 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel 04 67 71 05 79) . Se ne, ni nur konos la numeron de la konto de la paginto sen alia indiko... kaj ni ne estas disĉiploj de Harry Potter ! Kun la kasistino kaj Josée Boccadifluoco, kiu konsentis anstataŭi André Capus por la presado kaj ekspedo, ni provos ĝisdatigi la adresaron . Helpu bonvolemajn bonvolulojn (des bénévoles de bonne volonté) ! Anticipan dankon !

Merci d'avance aux groupes qui voudront bien nous envoyer en une fois, lors du renouvellement des abonnements en début d'année, chèque global + liste des noms / adresses . Pour les abonnements individuels, ne pas envoyer votre chèque aux CCP mais à la trésorière (adresse ci-dessus), sinon des erreurs d'imputation sont possibles .

Abonoj kaj kotizoj : Ni ankoraŭ ne ricevis la tarifon de abonoj kaj kotizoj por 2007 . Jen kun rezervoj la tarifoj por Esperanto-France (UFE) : aliĝo 33^E (senlaborulo 15^E) LME (bulteno « Le Monde de l'E° ») : 22^E por membroj, se ne 30^E .

Esperanto-Jeunes (JEFO) –ĝis 30 jaroj-: 30^E (15^E por studentoj kaj senlaboruloj, 10^E por ĉiuj la unuan jaron)

UEA : simpla kotizo kun gvidlibro 9^E, same kun la Jarlibro 22^E, plena kotizo (gvidlibro+Jarlibro + « Esperanto » (monata revuo)) : 56^E .

En la venonta SFS ni provos listigi la ĉefajn eventojn en Esperantio en 2007, en Francio kaj eksterlande . Aliĝo al la UK kostas malpli, se vi aliĝas antaŭ la jarfino . Ĉi-poste mencio de internacia evento jarfine .

IF : Internacia Festivalo : Tiu tradicia kaj sukcesa novjara aranĝo disvolviĝos ĉijare en Germanio (Saarbrücken) en komforta junulara hotelo (ĉiuj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo) . Detaloj troveblas ĉe : <http://www.internacia-festivalo.de> . Sur la interretaj paĝoj vi trovos raportojn kaj fotojn de la pasinta IF-etoso en Trier . Varia programo kun altnivelaj prelegoj matene kaj posttagmeze, tuttaga ekskurso al Strasburgo, kursoj, promenoj . Interesa vespera programo, silvestra balo ... Koncertos Jomo, magios Trixini, prelegos S-ro Mukunda Pathik, Nepalano atendata en decembro en Montpellier... « Esperanto » de februaro parolis pri « bunta, multaspekta, kleriga, bone organizita, etosoplana renkontiĝo » . Kion plian atendi por komenci agrable la novan jaron ?



*23a IF : de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro ;
jam aliĝis 112 personoj el 16 landoj,
ĉiujare partoprenas inter 160 kaj 200 el ĉirkaŭ 20 landoj,
la aranĝo por mezaĝuloj kaj familioj...*

TRA LA FEDERACIO

BEZIERS

Venontaj kunvenoj : la 14an de oktobro, la 18an de novembro, la 13an de januaro (ĝenerala kunveno), la 10an de februaro, ĉe la MVA kiel kutime .

La Z. tagon ni festos la 2an de decembro ekde la 10h30 ĝis la 17a . La programo ne estas finpreta, sed ni dezirus, ke ĉiuj niaj anoj prezentu laŭeble ion laŭ sia ebleco, eĉ mallongan historieton .

Ni komune manĝos en restoracio je prezo ne tro alta . Ĉiuj estas invititaj festi kun ni . Sed avertu nin antaŭ la 3a de decembro por la manĝo en la restoracio .

P.S : Ni memorigas al vi la datojn de la staĝo en Batipaume : de la 16a ĝis la 23a de majo ; eble hungara gvidantino partoprenos en ĝi .

« **La aleoj de asocioj** » : La 9an de septembro, frumatene, Fernande, Line kaj Christophe alvenis je « placo de la citadelo » flanke de la aleoj Paul Riquet . Nia budo ne estis tre bone lokita . La triopo preparis la budon de esperanto, ĉar estis la tago de « la aleoj de la asocioj » .

Sur tablon ni metis diversajn librojn, bildstriojn, informojn kaj multajn faldfoliojn por klarigi « Kio estas esperanto ? Kie lerni tiun lingvon ? » . Ni ankaŭ aranĝis grandan flugrubandon kaj elektronikan panelon por allogi la promenantojn .

Matene malmulte da personoj promenis inter la multnombraj budoj . Posttagmeze la popolamaso pli kaj pli densiĝis . La geesperantistoj de la grupo kaj Jean-Marie el Montpellier alvenis . Ni parolis pri esperanto, donis dokumentojn, klarigojn, uzis la panelon kun la scivolemuloj, kiuj staris antaŭ nia budo . Kelkaj personoj, tre interesitaj, enskribis siajn nomojn kaj adresojn . Ili intencis eklerni esperanton . Ni informis ilin pri la rendezuo de la 16a de septembro por prepari la kursojn . Ĉu ili venos ? Dum la tuta tago la suno multe brilis kaj ni bedaŭris, ke sur la placo ne kreskas arboj ! Ĝis la 18a, la grupo restis surloke, esperante, ke novaj geamikoj kuniĝos la CBE .

Suzanne kaj Line

Anonco : *Laŭstatute la federacio ne pritraktas politikajn kaj religiajn temojn . Do same pri la federacia bulteno . Pro tio ne aperas longa teksto sendita de Guy Carquet (36, Bd du Languedoc, 34500 Béziers) . Temas pri « la kolektivo de Biterrois, kreita por diri ne al la eŭropa konstitucio » . Ĝi estas « asocio de kolerantaj civitanoj, devenantaj de ĉiuj horizontoj de la maldekstra movado » ...*

« Tio, kio unuigas nin, estas komuna volo de rezistado kontraŭ la diktaturo de kapitalismo » ...

« Nia kunveno estas ĉambrego pruntedonita al ni, 2, rue Voltaire 34500 Béziers » ... « Ekzistas pli ol 600 kolektivoj en Francio ! Vi povas kontakti nin per la 04 67 76 43 78 por informiĝi pri la adreso de tia kolektivo en via urbo » ... « Ni celas kontakti eŭropajn kolektivojn pere de esperanto kaj de la revuo «La internaciisto» » .

LOZERE

Kiel anoncote aliloke en tiu bulteno, F. kaj M. Bernard prizorgis E°-budon (“E°-Info”) okaze de forumoj en Mende kaj Ruynes en Margeride . Venis multaj interes(it)aj demandoj .

Okaze de grupojaĝo al Germanio, kadre de partnereco kun germana vilaĝo, J. Hénin kontaktis esperantiston en Freiburg por viziti la “verdan” kvartalon, t.e. kvartalon, kie oni amplekse uzas la sunenerĝion . La vizito estis gvidita en E° kun traduko en la francan; kelkaj personoj, kiuj aŭdis E-on por la unua fojo, diris, ke la lingvo aspektas al ili klara kaj simpla .

LUNEL

Forumo de asocioj la 17an de septembro : bela vetero, suna tago, alloga budo sed malmulte da respondeculoj de CCE . Feliĉe, « Gojofogo » (Georges Gonthier), tre konata en Lunel, ĉar li kunlaboras kun la MJC, alparolas simpatie al la vizitantoj, junaj kaj maljunaj, (+ al la kutimaj viglaj junemeritoj) . Il nomoj estas registritaj, el kiuj pluraj tre interesitaj . Ni esperas, ke ili aliĝos la kurson .

MONTPELLIER

Kunvenoj kiel kutime en MPT l'Escoutaïre, sabate de la 10a h ĝis la 12a, kun la ebleco kunmanĝi poste ĝis la 14a h . **Datoj : la 21an de oktobro, la 9an de decembro (ni akceptos Nepalanon la 16an kaj 17an kaj ĝojos vidi geamikojn el aliaj urboj, kontaktu nin pri detaloj : 04 67 59 80 13), la 13an de januaro, la 10an de februaro, la 10an de marto, la 21an de aprilo, la 19an de majo, la 16an de junio .**

Montpellier (daùrigo) : Forumo de asocioj

Frumatene 5 geamikoj (Jean-Marie, Louis, Georges, Claudine, Monique) alvenis por instali la du budojn (CCE+ECP). Ĉijare la vetero estis favora, nek vento por forĵeti la affŝojn, nek suno por ĝeni nin. La blanka tendaro protektis nin; ni vidis multajn feliĉajn kaj babilantajn samideanojn ĉe paneloj, libroj kaj revuoj. Ĉiuj rimarkis la grandan intereson de la vizitantoj, junaj kaj maljunaj + viglaj junemeritoj. Oni konas E-on, ĉar oni aŭdis pri ĝi, oni ĉiam volis sed ne povis praktiki ĝin, oni volas komenci ĉijare, ktp. Multaj demandoj pri la stato de la lingvo en la mondo. Finfine registriĝis 17 homoj; espereble kelkaj konfirmos post ricevo de letero kun la horaroj kaj adresoj de la kursoj. Kiel ĉiun jaron, ni bedaŭras la lokon asignitan de la urbdomo, kontraŭaleo en ombro sed malmulte vizitata; ni petos alian lokon, proksime de aliaj kulturaj kaj lingvaj asocioj.

Kursoj

En MPT l'Escoutaire : ĵaŭdon, 9h30-11h30,
en MPT Georges Brassens : lundon 14h30-16h kaj merkredon 18h-19h30,
en la MJC de Lunel : sabaton 9h30-12h. ↵

Asocio « Esperanto, kulturo kaj progreso » (ECP) (prizorgado de la « semajno » de Sète)

Sekve de la ĝenerala kunveno de la asocio estis elektitaj Jean-François Passarella kiel prezidanto kaj Louis Ensuque kiel sekretario. Ni estas dankemaj, ke ili surprinis la respondecon de la « semajno » kaj ni deziras al ili bonan sukceson.

Asocio « Réinsertion et Espéranto »

La ĝenerala kunveno okazos sabaton, la 18an de novembro je 13h30 je la sidejo de la asocio, 26, rue Enclos Fermaud 34000 Montpellier. Ĉiuj ideoj estos bonvenaj.

P-O : PRADES

La 9an de septembro okazis en Prades la unua « tago de la asocioj », organizita de la urbeŝtaro. Sabate okazas en Prades la ĉiusemajna loka foireto. Pro tio kaj pro la agrabla vetero, la sukceso ĉeestis. Deĵoris preskaŭ la tuta grupo E°-Conflent por prezenti la asocion kaj ties kursojn, la lingvon kaj ties avantaĝojn. Krom la kutimaj vizitantoj, kiuj ne komprenas la bezonon de internacia lingvo neŭtrala, ĉar « la angla jam sufiĉas », eĉ se ili ne konas unu vorton de ĝi, interesajn kontaktojn havis nia areto kun personoj, kiuj jam aŭdis pri esperanto aŭ jam pensis pri la problemo de la egaleco de la lingvoj. Tio montras, ke eĉ niaj pasintaj agadoj, artikoloj aŭ prelegoj ne tuj fruktedonis, sed ke la grenoj tiam semitaj nun leviĝas.

Evidente, kiel ĉiujare, ni atendas nun por vidi, ĉu la promesoj iĝas realo kaj se, el la deko da personoj reale interesitaj por lerni la lingvon, venos almenaŭ kelkaj. Fakte, eĉ en nia urbo de malpli ol 6000 loĝantoj, ekzistas nun pli ol 40 asocioj, ĉiuj pli allogaj unuj ol la aliaj. Tiu kreskado de la nombro de asocioj malfaciligas nian taskon. Post konvinko pri la intereso lerni nian lingvon, ni devas nun trovi la taŭgan horon por ĝin instrui meze de la lavango de la aliaj okupadoj. Tiam, pli ol la raciaj argumentoj, pli savas nin la amika etoso de nia grupo kaj la bela rideto de ties anoj!

Christian Pinard

Renkonto en Vallmanya (en oktobro)

La grupo "E°-Conflent" organizis, kun la helpo de KEA (Kataluna E°-asocio), sian kutiman aŭtunan renkontiĝon. Ĉijare, post la mezepoka kastelo de Vilafranca de Conflent pasintjare, nia aro de geamikoj retrovis sin en la montara gastejo de Vallmanya.

La vilaĝo Vallmanya situas meze de la valo de la Lentilla, tiu valego kiu kondukas ĝis la altebenaĵo de Cortalets, piede de l'monto Canigò. Kvankam la vojo por tien iri ne estas plej facila, la loko estas belega pro la proksimeco de la unuaj pintoj de Pireneoj, pro la sovaĝeco de ties arbaroj, pro la pureco de la vidpunkto.


La unuan posttagmezon nia grupo piediris al la malnova ferminejo de La Pinosa. Krom la malfacilecon de la laboro de niaj antaŭuloj en tiuj subteraj galerioj, tiuj lokoj rememorigas al ni ankaŭ la kruelecon de la dua Mondmilito. Ĉi-tie okazis la batalo de la nazioj kontraŭ la francaj kaj hispanaj makisanoj de la grupo « Henri Barbusse »; tabulo montras la lokon, kie la naziaj fiuloj pafmortis Julien Panchot. Dum la reveno al la gastejo ni ĝuis aŭtunan promenadon, sub kelkaj pigremaj nuboj, aŭdante la sonorilojn kaj la blekojn de la ŝafaroj reirantaj la ŝafejon.

Grandega momento de kuirarto atendis nin ĉe tablo: niaj gastigantinoj, S-ino Mary kaj ties filino,

preparis dum la tuta posttagmezo mirindan « civet de singla » (sangosaùcaĵo de apraĵo), kun kuiritaj piroj kaj ties frambokonfitaĵo, akompanita de « gratin dauphinois » (terpomoj kuiritaj kun kremo kaj fromaĝo)...Ŝi mem ĉasis la apron kelkajn tagojn antaŭe, kaj eĉ vegetaranoj ja forgesis dum kelkaj horoj siajn kutimojn por ĝui tiun regalon .

Ni devis denove gratuli niajn ĉefkuiristinojn por la tre agrabla matenmanĝo, kie la francaj « brioches » ludis sur la tablo kun la rostitaj panoj meze de la kruĉetoj de lakto, de kafo kaj de oranĝsuko . Matenaj sunradioj briligis la tasegojn kaj ni ĝuis tre dolĉan vekiĝon, ja bezonata post la frenezaj kantadoj de la nokto en diversaj lingvoj kun akompano de violonoj... « La Trinca » (kataluna muzikgrupo) trinkigas, ĉu vi sciis pri tio ?!

La dimanĉa mateno daŭris per promenado ĝis la farmbienoj de Los Masos, parolante pri manĝeblaj fungoj, pri esperanta gramatiko kaj pri la arto de instruado . La suno milde varmigis nin kiam ni revenis al la gastejo, kie Ferriol kaj Christian kantigis nin per la muziko de la violonoj, kaj tiu ĝuinda vetero ebligis la dimanĉan manĝadon sur la teraso . Alia miraklo de tiu kataluna kuirarto, la « boles de picolat » (buletoj de viando kun saŭco el fungoj kaj olivoj) ĝojigis nin denove . Post la kafo kaj la likvoroj venis la tempo de l'adiaŭoj, kaj ĉifoje ni forlasis malĝoje ne nur nian amikan rondon, sed ankaŭ niajn gastigantinojn .



Gaja etoso cirkaŭ gastronomia tablo

La anoj de la loka grupo de Prada parolas nun kun la okuloj plenaj de rememoroj pri tiu gastronomia renkontiĝo, jam planante iun privatan dimanĉan tagmanĝon ĉirkaŭ apraĵo...Ĉiam por la sukceso de esperanto, evidente !

C.P.

NDLR : Gratulojn pro la sukcesa aranĝo kaj la detala priskribo (ni povas preskaŭ flari la bonodoron de la servitaj pladoj) ! Certe kelkaj federacianoj volonte kuniĝus alian fojon, kondiĉe ke la informo venus frue kaj ke la renkonto ne okazus samdate kiel jam anoncita aranĝo (konsulti SFS) .

Pli frue Jefe organizis gastronomiajn semajnfinojn kaj poste aperis E°- libretoj kun la lokaj receptoj. Kiam aperos libreto en la internacia lingvo por konigi la katalunan gastronomion...al la mondo ?

Ĉe niaj najbaroj : « Sudo Pireneoj » kaj Tuluzo

Niaj geamikoj anoncas en novembro kaj decembro la jenajn rendevuojn :
la 11an kaj 12an de novembro (de sabato 10h ĝis dimanĉo 17h)
 en 09800 Arrout : semajnfina inicado al E° aŭ perfektiga (paroliga) kurso aŭ pedagogia seminario . Distra vespero kun ludoj kaj filmoj .
 Loĝado en 3- kaj 6-litaj ĉambroj .
 Organizanto : CCE Tel 05 61 25 55 77 esperanto.toulouse@free.fr



La Tuluzaj E°-asocioj invitas al la **E°-tago** (kulturo, libroj, muzikoj) **dimanĉon, la 17an de decembro** en Maison de Quartier « Arènes romaines », 107 Av. des arènes romaines 31300 Toulouse .

10 h : jara kunveno de la regiona asocio « Sudo-Pireneoj »

13 h : komuna tagmanĝo (rusa menuo, preparita de rusa kuiristo)

15 h : distra programo : kantoj (diversaj stiloj, diversaj lingvoj)

Tutage : libroservo (libroj kaj diskaj) kaj montrado de filmoj .

Aliĝo antaŭ la 30a de novembro (tagmanĝo = 15^E, gejunuloj = 12E)

ĉe E°-kulturcentro, 1, place des Avions 31400 Toulouse

Tel : 05 61 25 55 77

Sin anonci frue por eventuala gastigado sabaton vespere ĉe Tuluzaj gesamideanoj

SOMERAJ EVENTOJ

CAMPAGNAN : ekspozicio « Art-Culture-Loisirs » de la 1a kaj 2a de julio

En Campagnan, vilaĝeto flanke de monteto, kiu superstaras la oran valon, ne malproksime de Pézenas, loĝas diletantartistoj, kiuj firme valorigas kaj konigas al ĉiuj siajn farsciojn . Pro tio ili organizas ĉiujare ekspozicion en la granda kaj mirinda festsalono de Campagnan . En tiu larĝa spaco 25 budoj kun tre diversaj esprimmanieroj instaligis, por prezenti al la vizitantoj pentrartojn, potfaradojn, fajencojn, skulptartaĵojn, artfotojn, diversajn riĉajn literaturojn kun la ebleco lerni lingvojn, inter kiuj esperanton .


La kunlaboro de esperantistoj de la regiono Langvedoko-Rusiljono ebligis instali standon kun prezentilo de diversaj libroj, dokumentoj, prospektoj, aŭdkasedoj, vidkasedoj, klariga tabulo, diversaj inform- kaj reklamtabuloj, ktp, en sufiĉe larĝa spaco, kie superstaras flagrubando « Esperanto » .

Kiel lastjare, dum la posttagemezo sabate kaj tuttage dimanĉe, la vetero estis tre varma kaj oni multe suferis pro tiu varmego . Plie, dum la tuta semajnfino okazis matĉoj por la futbalmondpokalo, ankaŭ la biciklista rondirado de Francio, ankaŭ rugbifinalo . Pro tiuj eventoj kaj la forta varmo, la vizitantoj estis malmultenombraj, je la malespero de la ekspoziciantoj .

Feliĉe nia budo allogis kelkajn vizitantojn, al kiuj oni devis bone kaj klare ekspliki, kio estas esperanto, kaj ĉefe insisti pri la graveco kaj la avantaĝo paroli tiun lingvon, por pli bone komuniki tra Eŭropo kaj la tuta mondo, ankaŭ montri la facilecon lerni ĝin . Ĉiujfoje oni disdonis dokumentojn por pli bone informi . Oni devis multe paroli por persvadi kelkajn vizitantojn, kiuj malkovris la internacian lingvon kaj kiuj poste intencis kontakti nin por lerni ĝin .

Dank'al niaj geamikoj Monique, Lucile kaj Francis Bernard, Line Maurel, Geneviève Gaubert, Marlène kaj Arie Bouman, Marithé Lemaire kaj Gilbert Santos, kiuj senĉese bone deĵoris, atentemaj al la demandoj de la vizitantoj . Dinamika skipo, kiu ege deziras progresigi esperanton, por ke ĝi daŭre disvolviĝu kaj ĉiam vivu .

G.S.



BOURESSE : staĝo

1, 2, 3, 4, kvarfoje ni partoprenis en la staĝo « Esperanto kaj muziko » en Bouresse . Ni retrovis niajn karajn geamikojn kaj profesorojn plezure . Emanuelo, kiu venis el St Lô, estis nova partoprenanto ; li ŝatis la etoson kaj la agadojn . Li estis tre kontenta paroli esperante kaj muziki per violono kun aliaj gejunuloj .

La diversaj prelegoj interesis nin . Lino parolis pri John Dowland (16a jarcento) kaj poste ni ludis liajn muzikaĵojn . Vinko klarigis la diferencon inter la krioj kaj la kantoj de la bestoj . Per la uzo de KD, komputiloj, bildoj, la gejunuloj prezentis la muzikaĵojn, kiujn ili kutime aŭskultis . Tiel ni malkovris la usonan metalgrupon « Slipknot », Diams, Kyo, The Beatles . Emanuelo prezentis sian grupon kaj sian KD . Ĉiam ni multe kantis esperantajn kantojn kaj kelkajn tradukitajn de ni . Laŭvice, en malgrandaj grupoj, ni preparis diversajn muzikaĵojn, ĉefe barokstile, kio taŭgis al niaj instrumentoj .

Fine ni koncertis dum unu horo kaj duono antaŭ la invititaj vilaĝanoj . Ni havis multe da sukceso . Kiam ni revenos hejmen, ni plezure aŭdos la registritan KD de la koncerto .

La etoso estis bona . Kun plezuro Olivje tre bone nutris nin . Poste, ambaŭ, ni iĝis « kuiristinoj » por la sekvanta staĝo . Tamen, matene, kun Suzana, ni partoprenis en la skribita traduko . Bedaŭrinde, posttag-meze, ne eblis vizitadi la kurson pri konversacio gvidita de Sergo . Malgraŭ la laboro, ni vizitis la muzeon de Poitiers, kelkajn romanikajn preĝejojn . La belega « festo de la tritiko » interesis nin pro la uzo de malmodernaj maŝinoj .

Kiel kutime, kiam ni disiĝis, ni diris « ĝis baldaŭ ! » kaj rendezuis en 2007 en Bouresse .

Genoveva kaj Lina

P.S : Ni konstatis, ke la nombro de staĝanoj malpliiĝas, kiel por nia staĝo en Batipaume . Ŝajnis al ni, ke tio iĝas ĝenerala problemo . Oni parolis pri tiu grava afero ; tamen ni ne havas respondon . Eble, ĉu la homoj ne plu havas sufiĉe da mono ?

UNUA UK

Impresoj

Unue la multego da prelegoj surprizis min pozitive ; estas granda riĉeco...sed ankaŭ negative, ĉar oni ne povas ĉion ĉeesti ! Mi trovis la uzinstrukciojn kaj klarigojn de spertaj ĉeestantoj ! Malgraŭ la netaŭga oficiala salono, la etoso estis agrabla . Ekde la U.K. mi korespondas kun Danino . Hélène

Ni veturis aŭtomobile al Florenco, ĉar estas belega urbo kaj vera muzeo, ankaŭ pli proksima ol Rennes, kie estis la UFE-kongreso . Mi ŝatis la etoson, ĉefe la parkon kaj la libroservon . La UK estis en bela palaco, taŭga por internacia kongreso . La salonoj estis diversaj kaj belaj . Oni prezentis spektaklojn kaj interesajn prelegojn . Eble estas nur ege tro da eventoj, eĉ por novbakitoj ! Nekredeble pli ol sesdek landoj estis ĉeestantoj . Unufoje en restoracio estis nur E-kongresanoj . Krome, mi gastis en bela hotelo apud la kongreso . Nur kelkaj paŝoj sufiĉis por atingi la kongresejon . Christian

MIA UNUA UK

La 28an de julio post noktomezo kune kun 7 geesperantistoj ni enbusiĝis el Montpellier al Florenco . La nokto iom laciĝis nin, tamen la alveno ĝojigis nin . Mia itala korespondanto Aŭgusto atendis min ĉe la enirejo de la kongresejo . Feliĉe, ke li atendis min, ĉar mi certe devintus serĉi multe pli longtempe por preni la dokumentojn ĉe la akceptejo . Li jam estis aĉetinta por mi semajnbusbiletajn, tiel en la daŭro de kelkaj horoj ni alvenis ĝis la studenta ĉambro, kie mi kunloĝis kun la amiko Jorgo . Bela surprizo atendis nin : la ĉambro estis bele lumigita per du grandaj fenestroj, granda balkono, ne tro eta banĉambro, kuirejo kun fridujo, tablo, seĝoj, la dormoĉambro kun 2 labortabloj kaj jam pretaj litoj . Do nur la tempo malfermi la valizojn kaj jen dormeto estis bonvena .

Feliĉe la ĉambro entenis malvarmigilon, ĉar la varmego estis terura, same kiel en Francio . Do bonŝance ni ne suferis pro varmego nokte . Post la ripozo, ni iris aĉeti manĝaĵojn, ĉar la monujo estis preskaŭ malplena post la pago de la loĝejo, kaj restoracioj estos nur okazaĵo . Ni aĉetis fruktojn, fromaĝon, panon, tiel ni ne mortos pro malsato !

La nokto kaj belaj sonĝoj permesis al ni bone komenci la dimanĉon . Je la 10a h, ni atingis la malnovajn fortikaĵojn kaj la salonon Zamenhof, kie okazis la malfermo de la kongreso . Tiu salono estis fakte remizego, kie vicoj kaj vicoj da seĝoj atendis la postaĵojn de 2200 partoprenantoj . Granda podio akceptis la estraranojn, inter kiuj mi rekonis S-ron Corsetti, Mikaela Lipari, Maritza Gutierrez, Claude Nourmont (kiun mi fakte vidis por la unua fojo) . Dekstre kaj maldekstre de la podio pendis grandaj ekranoj, montrante la homojn sur la podio al la malproksimuloj . Renato Corsetti legis la salutojn de la itala Prezidento, kaj diversajn landojn reprezentis eksterlandanoj . Maljuna serbo, vestita per tradicia kostumo, kiun mi jam estis vidinta en buso, rakontis, ke tiu kostumo apartenis al lia patro, kaj certe eĉ al lia avo, nur la ĉapeleto estis nova . Poste mi eksciis, ke li ofte sin prezentis dum kongresoj, sed mi, kiel tute nova partoprenanto, multe miris pri ĉio . La fino de la malfermo tre kortuŝis min, kiam ĉiuj staris kaj komencis kanti « La Espero » . Unufoje aŭdi la kantvortojn skribitajn de L.L. Zamenhof estas vere emociego . Elirante la salonon, ni renkontis Hélène kaj Christian kaj aliajn geesperantistojn, same emociitajn kiel ni . Itala restoracio akceptis nin, ni gustumis spagetojn kun marfruktoj, sed mi konfesas, ke mia bopatrino multe pli bone kuiras ilin !

Poste Jorgo vizitis ekumenan servon kaj Aŭgusto ekskursis . Laŭ Jorgo, 5 pastroj kantis kaj prelegis en E^o en la preĝejo Sankta Lorenzo, kiu estis plenplena . Miaflanke, kiel ateistino, mi evitis la preĝejon kaj reiris hejmen por ripozi kaj poste fortega rendoloro akompanis min de la komenco ĝis la fino de la restado en Florenco . Trankvile mi elektis prelegojn, kiujn mi deziris aŭskulti; bedaŭrinde nur malmultajn mi povis ĉeesti .

Tute proksime de nia loĝejo ni eltrovis kafejeton, kie ni matenmanĝis ĉiutage por vere modera prezo : unu „latte makiato“ kaj unu « lunarkabulko » kostis nur 1 eŭron kaj 30 centimojn . Do la mateno agrable komenciĝis por ni ĉiutage, aŭskultante la italan lingvon, kiu tiel ŝajnis konata al mi, ke mi pensis esti en Esperantujo, despli ke en la busoj ĉiam estis kelkaj esperantistoj kun siaj E^o-insignoj .

Kompreneble mia unua vizito estis por teatraĵo, ludata de angla trupeto; ili bone ludis sed aĉa akĉento iom ĝenis min . Mi vidis ilin dufoje, kaj ankaŭ mi aŭskultis la provkantadon de la koruso, kiun bedaŭrinde mi ne iris aŭskulti dum la granda kaj bela Internacia Vespero . Jes, mian unuan UK mi ne plene ĝuis, tamen la renkontiĝo kun eksterlandanoj plenigis mian koron .

Dum la oficiala bankedo, Jorgo kaj mi sidis ĉe tablo kun du geusonanoj kaj du gejapanoj . La interparolado kompreneble estis interese, ni interŝanĝis retadresojn kaj la japana edzino “origamis”

(« Mia unua UK » -daŭrigo)

por ni pere de kelkaj paperpecetoj, kiujn ni trovis en niaj aferoj . La menuo havis nenion specialan, plie la konversacia bruego ĝenis por interparoli, sed 6 eksterlandanoj, tiel malproksimaj unuj de aliaj, kiuj interkompreniĝis tiel facile, estas miraklo, ĉu ne ? Ni eĉ ne bezonis la helpon de vinboteloj, sed ĉe aliaj tabloj sin sekvis pluraj boteloj (da vino kompreneble) kaj oni aŭdis kantojn ĝis la 22a horo . Feliĉe la busoj rondiris ĝis la 24a, kaj la trairado de la malnova urbo estis varmega meze de homamaso . La turistoj, sed ankaŭ la italoj, ĝis malfrue promenadas . Do la reiro en la mallumo estis iom pli agrabla nokte sub la steloj ol sub la terura suno .

Tiu unua UK ŝajnis stranga al mi kaj samtempe mi estis ege kontenta vidi tiom da eksterlandanoj, ĉiu kun sia akĉento, kaj ankaŭ mi bedaŭris ne povi partopreni la prelegojn, kiujn mi ŝa. _ tus viziti . Sed estas tiel kaj nun mi estas kontenta, ke mi travivis tiun sperton .

Mi ne devas forgesi paroli al vi pri la revenvojaĝo, kiu nun ridigas min, sed kiu en la momento tre kolerigis min . Jen do kio okazis : la buso por reveni malfruiĝis proksimume unu horon antaŭ ol eliri Florencon, poste je la landlimo pro ŝtopiĝo ni atendis vere longtempe, kaj la buso haltis por preni 3 gejunulojn . La du ŝoforoj devis eliri kune por ordigi tri valizetojn en la kofro, poste plurfoje ili petis de la gejunuloj la busbiletojn, sed tio ne sufiĉis, la buso tute ne ekmoviĝis, fine mi ekstaris kaj demandis al la vojaĝantoj, ĉu ne ŝajnas al ili, ke oni traktas nin kiel brutaron . La ŝoforo tuj malŝaltis la lumon en la buso, dirante, ke li atendas la konfirmon de la estro por ŝalti . Fakte li tuj ekmovis la buson, strange, ĉu ne ? La kulmino por mi estis kiam la buso eniris Nice por ellasi virinon ; tie la buso rondiris trifoje en la urbo, la ŝoforoj petis la vojon dufoje, eĉ unu el ili devis iri por telefoni kaj finfine ni vidis la busstacidomon . Je la 6a matene anstataŭ la 4a la buso haltis en Montpellier kaj mi diris al la ŝoforo, ke mi ŝatus ne plu vojaĝi kun li . Tiel finiĝis la vojaĝo al Florenco . Ĉu ĝi lasis al mi bonegan impreson ? Ĉu malbonan ? Mi ne povas diri ; ĉio ankoraŭ konfuziĝas en mia kapo, kaj mi rezervas mian respondon . Tio, kion mi povas diri, estas, ke multfoje mi aŭdis la rimarkon : « la organizo tute ne valoras tiun de Montpellier » .

Josée Boccadifuoco





« *Universala Kongreso* » estas escepta okazo renkonti kaj alparoli homojn el la tuta mondo .


Se vi revas pri vastaj horizontoj, pri homoj kun aliaj kutimoj, se vi ankaŭ disponas pri iom da tempo kaj da mono, legu sur la paĝo 2a pri la propono kunvojaĝi al la UK de Jokohamo (Tokio), traveturante diversajn landojn...



La urbo Jokohamo kaj la tuta japana esperantistaro tutkore invitas vin al la 92a UK en la jaro 2007!




1





2

SOMERA EVENTO : la UNIVERSALA KONGRESO

2209 esperantistoj el 62 landoj kunvenis ĉi-somere por la 91a UK . Inter ili, dek el nia regiono (por pluraj estis la unua UK) . Post nokta busveturado, ni atingis Florencon matene . Varma vetero akompanis nin dum la tuta semajno . La kongresejo estis tute proksima de la bushaltejo . Per interreto mi rezervis hotelon tute proksime, je tarifo pli interesa ol tiu proponita de UEA . Kvankam mi montris mian francelingvan rezervilon, la akceptistino parolis al mi nur angle . Mi demandis al ŝi poste, kial ŝi alparolis min en alia lingvo ol la itala aŭ la franca, kaj tiam ŝi parolis al mi en perfekta franca lingvo ! Fakte kun la multegaj turistoj oni ofte uzas la anglan ! Pri la UK mankis en la urbo afiŝoj, banderoloj, flagoj, vera kontrasto kun Vilno lastjare . Pri la informado estis ankaŭ mankoj ; ekzemple nur en la lastaj tagoj oni eksciis pri la senpageco de la muzeoj . Komprenoble estis plezuro revidi geamikojn, konatiĝi kun novaj gesamideanoj . La programo estis riĉa . Ankaŭ estis interesa junulara programo sed ne vere proksime . Kelkaj gravaj programeroj kiel la



9



7

8

malfermo kaj fermo de la kongreso, la nacia vespero, dis-volviĝis en longa halo, ne taŭga por tiaj cirkonstancoj . Dum la malfermo Renato Corsetti, la prezidanto de UEA, diris : « Davido estas ni kaj ni estas Davido . Ankaŭ ni kiel li batalas kontraŭ nia Goljato, alivorte kontraŭ la perforto en la kampo lingva kaj kultura .../... »

Tamen Davido triumfis, ĉar li reprezentis la juston kontraŭ la blinda forto . Ankaŭ ni reprezentas la juston kaj ankaŭ niaj ŝtonĵetiloj estos gvidataj de la justo, kiu kuŝas en la konscio de ĉiu homo » .

Ankaŭ alparolis la kongresanaron Profesoro François Grin .

Li legis (iom rapide) tekston en esperanto pri sia raporto ; li rimarkigis, ke iuj esperantistoj misprezentis la celon de la raporto, kiu ne estas pledo por esperanto sed propono de solvo .

Mi lasos la parolvicon al aliaj, por kiuj estis la unua UK .

Nur aldonendas, ke Florenco estas vere plenaera muzeo kun multegaj artaĵoj . Mi ne nur kongresis sed ankaŭ promenis tra la urbo kaj multe fotis . Mi povas disponigi la bildojn, memfaritajn aŭ aĉetitajn, al kiu volos prezenti la kongresurban . Por vi, kiuj ne havis la ŝancon viziti la UK, jen kelkaj bildoj, malfeliĉe nur blankaj/nigraj :

